Fervoja Esperantisto

Informilo de Germana Esperanta Fervojista Asocio
Mitteilungsblatt der Deutschen Eisenbahner-Esperanto-Vereinigung
in der Stiftung Bahn-Sozialwerk

GEFA
STIFTUNGSFAMILIE
BSW & EWH

Numero 4 Oktobro - Decembro 2025

Malbonvena amiko

Ein unwillkommener Freund



Meloj zorgas por longdaŭraj baroj de fervojaj linioj.
(foto: Peter Trimming WikiMedia, vd. paĝon 9)

Dachse sorgen für lange Sperrungen von Eisenbahnstrecken.
(Foto: Peter Trimming WikiMedia, s. Seite 9)

Karaj gelegantoj	2	Liebe Leserinnen und Leser	2
Pegoj dumtage – gufoj en la nokto	3	Spechte am Tag – Uhus in der Nacht	3
Ruliĝanta teatro sur reloj	6	Rollendes Theater auf Schienen	6
Helga Vogelsang 08.03.1936 – 15.08.2025 ..	8	Helga Vogelsang 08.03.1936 – 15.08.2025	8
Malbonvena amiko	9	Ein unwillkommener Freund	9
Nova varbfolio de GEFA en Esperanto	11	Neues Werbeblatt der GEFA in Esperanto	11
Obstakloj en la komunikado	12	Hindernisse in der Kommunikation	12
GEFA-anoncoj, redakcio	12	GEFA-Mitteilungen, Redaktion	12



Karaj gelegantoj,

la debatoj estas timigaj. Ĉio, kion oni objetis al tiuj, kiuj rifuzis la soldatecon: ke ni ja devas esti preparitaj por tio kion ni ne volas, alie ĝi okazos; tiu frazo „se vi volas pacon, preparu la militon“ de la romianoj, kiuj de komenco ĝis fino de sia regno militiris; la postulo, adapti la prioritatojn al la novaj faktoj; la postulo reiri al la ĝenerala deviga militservo, ĉar surbaze de libervolo armeo kun la bezonata batalforto ne estas rekrutebla; la „milita oferemo“ minacas rariĝi; nia lando devas denove fariĝi „militkapabla“.

Tio entute estas timiga por ĉiuj, la junaj kiuj estu devontigataj, kiuj per ilia laboro portu la ŝarĝojn kiujn ni – la maljunaj – metas sur iliajn ŝultrojn – kaj por ni, kiuj volis postlasi al ili kaj la sekvontaj generacioj pli bonan mondon.

Malfaciliĝis kredi je la sonĝo pri paco kaj pluevoluo, se al ni ĉiutage oni pruvas, ke ne reguloj decidas, sed la preteco minaci perforton aŭ uzi perforton. Sed ĉu tial estas malĝusta je kio ni kredis la pasintajn kvindek jarojn, ke estas eble kunvivi en libereco kaj justeco? Ĉu por ni restas al minacoj nur reagi per armigo „kion ajn ĝi postulas“? Ĉu estas senalternative doni la rimedojn, kiujn ni plej urĝe bezonas en la batalo kontraŭ la klimatoŝanĝo en ĉiam novajn armilojn – en investon sen dividendo, se ne tamen …

Pacifismo ne estas ideologio sunvetera. Kaj ne estas naive, persisti pri la ideo de paca kunvivado de la popoloj, resti skeptika kaj ne lasi sin infekti de la ĉie estanta batalkriado – ankaŭ en la intereso de niaj infanoj.



Guido Brandenburg

Liebe Leserinnen und Leser,

die Debatten sind beängstigend. Alles, was denen entgegengehalten wurde, die sich dem Soldatsein verweigert hatten; wir müssten doch vorbereitet sein auf das, was wir ja nicht wollen, sonst werde es eintreten; diese Weisheit „si vis pacem, para bellum“ der Römer, die von Beginn bis zum Ende ihres Reichs Krieg führten; die Forderung, die Prioritäten den neuen Fakten anzupassen; die Aufforderung, zur allgemeinen Wehrpflicht zurückzukehren, denn auf der Basis von Freiwilligkeit sei eine Armee mit der erforderlichen Schlagkraft nicht aufzustellen; der „kriegerischer Opfermut“ drohe knapp zu werden; unser Land müsse wieder „kriegstüchtig“ werden.

Alldas ist beängstigend für alle, die Jungen, die nun in die Pflicht genommen werden sollen, die mit ihrer Arbeit die Lasten tragen sollen, die wir - die Alten - ihnen auferlegen und für uns, die ihnen und den nachfolgenden Generationen eine bessere Welt hinterlassen wollten.

Es ist schwer geworden, an den Traum vom Frieden und Fortentwicklung zu glauben, wenn uns täglich bewiesen wird, dass nicht Regeln entscheiden, sondern die Bereitschaft, mit Gewalt zu drohen und Gewalt anzuwenden. Aber ist deshalb falsch, an was wir die vergangenen fünfzig Jahre geglaubt haben, dass es möglich ist, in Freiheit und Gerechtigkeit zusammenzuleben? Bleibt uns nur, auf Drohungen mit Aufrüstung zu reagieren „whatever it takes“? Ist es alternativlos, die Mittel, die wir dringendst im Kampf gegen den Klimawandel benötigen, in immer neue Waffen zu stecken – in eine Investition ohne Dividende, es sei denn …

Pazifismus ist keine Schönwetter-Ideologie. Und es ist nicht naiv, an der Idee vom friedlichen Zusammenleben der Völker festzuhalten, skeptisch zu bleiben und sich vom allgegenwärtigen Kriegsgeschrei nicht mitreißen zu lassen – auch im Interesse unserer Kinder.

(trad. Guido Brandenburg)



La Amikejo-turo memorigas pri la projekto fondi Esperanto-ŝtaton.
Der Amikejo-Turm erinnert an das Projekt einen Esperanto-Staat zu gründen.
(Foto: Bodo Ehrlich)

Pegoj dumtage – gufoj en la nokto

Estis la kalendara translokiĝo de la Germana Esperanto-Kongreso de Pentekosto en la aŭtunon, kiu devigis GEFA decidi pri sia kutima samsezona jarkunveno. Rezultis rezigno pri propra aranĝo kaj partopreno en tiu, kiun Germana Esperanto-Asocio nun organizis komune kun la nederlanda, la belgaj kaj la luksemburgia organizaĵoj.
La loko en Schleiden-Gemünd, novkonstruita junulargastejo rande de la nacia parko kaj natura rezervejo Eifel, montriĝis trafike iom defia, sed strukture tre taŭga por esperantistaj gastoj atendantaj varian programon kaj same ankaŭ eblojn por ĝui arbaron kaj freŝan aeron. Preskaŭ 150 esperantistoj sekvis la inviton.
La domo ofertis abundan spacon por plej variaj kontribuoj. La ekspozicio „Rezisti al milit-

Spechte am Tag – Uhus in der Nacht

Es war die kalendarische Verlegung des Deutschen Esperanto-Kongresses von Pfingsten in den Herbst, die die GEFA zwang, über ihre übliche Jahrestagung in der gleichen Jahreszeit zu entscheiden. Das Ergebnis war ein Verzicht auf eine eigene Veranstaltung und die Teilnahme an der, die der Deutsche Esperanto-Bund nun zusammen mit dem niederländischen, dem belgischen und dem luxemburgischen Verband organisierte. Der Ort in Schleiden-Gemünd, eine neugebaute Jugendherberge am Rand des Nationalparks und des Naturschutzgebiets Eifel erwies sich als verkehrlich etwas herausfordernd, aber strukturell sehr geeignet für Esperanto-Gäste, die ein vielfältiges Programm und gleichermaßen Möglichkeiten erwarteten,

propagando“ tuttempe povis okupi la vestiblon antaŭ la granda salono. Ĝi per kolekto de historiaj tekstoj kaj bildoj dokumentis la strategion, per kiu homoj estas preparataj por milito. Montri ĝin nuntempe, vidante en dangero la pacon en Mezeŭropo, estis malkvietiga impulso.

Tial aŭdi pri la kurioza epizodo „Neŭtrala Moresnet“, la hazarda kreaĵo de la Viena Kongreso, signifis taŭgan kompenson. Ĉu pro aliaj prioritatoj, ĉu pro la prefero danci – la granda diplomatia konferenco novordigante la postnapoleonan Eŭropon postlasis tiun 350 hektaran triangulon inter Belgio kaj Prusio/Germanio kaj pinto apud Nederlando sendecide al najbare implikitaj posteuloj. Tia ĝi restis dum pli ol cent jaroj, neŭtrala, ne vera ŝtato, kun tralasivaj limoj, interesaj solvoj celantaj bremsi hazardludojn, prostitucion kaj alkoholkonsumon, sen propra polico, kun urbestro sen klaraj taskoj, kun ekonomio surbaze de zinkominejo kaj kontrabando. Kun la kreaĵo Neŭtrala Moresnet en la jaro 1919 malaperis ankaŭ la ideo tie fondi Esperanto-ŝtaton.



Postrestintaj konstruaĵoj de „Burg Vogelsang“;
zurückgelassene Gebäude der „Burg Vogelsang“

Minoritato inter la kongresanoj proprainiciate vizitis la iaman nazian edukejon „Burg Vogelsang“. La neniam finkonstruita konstruensemblo super la Urft-valo celis kun aliaj tiaj centroj servi kiel akuŝejo por novaj generacioj de la ideala ĝermana raso. Kolekto de ekspoziciitaj dokumentoj desegnas la vojon de la nazioj al la potenco kaj la koncepton de tiuj edukejoj, kiuj

Wald und frische Luft zu genießen. Fast 150 Esperantisten folgten der Einladung.

Das Haus bot reichlich Platz für vielfältige Beiträge. Die Ausstellung „Der Kriegspropaganda widerstehen“ konnte über die ganze Zeit das Foyer vor dem großen Saal belegen. Sie dokumentierte mit einer Sammlung historischer Texte und Bilder die Strategie, mit der Menschen auf einen Krieg vorbereitet werden. Sie heute zu zeigen, wo wir den Frieden in Mitteleuropa in Gefahr sehen, war ein beunruhigender Impuls.



La Moresnet-Viadukto sur la linio Aachen-Tongern;
der Moresnet-Viadukt auf der Strecke Aachen-Tongern
(Foto: Bodo Ehrlich)

So bedeutete es einen passenden Ausgleich, von der skurrilen Episode „Neutral Moresnet“ zu hören, der zufälligen Schöpfung des Wiener Kongresses. Ob wegen anderer Prioritäten, ob wegen der Neigung lieber zu tanzen – die große diplomatische Konferenz, die nach Napoleon Europa neu ordnete, hinterließ dies 350 Hektar große Dreieck zwischen Belgien und Preußen/Deutschland und der Spitze neben den Niederlanden ohne eine Entscheidung den durch Nachbarschaft betroffenen Nachfolgern. So blieb es dann für mehr als einhundert Jahre, neutral, kein wirklicher Staat, mit durchlässigen Grenzen, interessanten Lösungen zur Eindämmung von Glücksspiel, Prostitution und Alkoholkonsum, ohne eigene Polizei, mit einem Bürgermeister ohne klare Aufgaben, mit einer Wirtschaft auf Basis einer Zink-Mine und Schmuggel. Mit dem Gebilde

nomis sin „lernejoj“ kvankam ili ne peris scion, sed formis junulojn blinde obeemajn, korpe trejnitajn, konsciajn pri sia eliteco.
La tereno ĝis la jaro 2004 estis uzata kiel ekzercejo de la belga armeo kaj depost la redono dediĉita al memorigo.
Kvankam por la gvidata promeno al certaj lokoj de la naturprotektejo la veteraj kondiĉoj estis iom malkonvenaj, grupo de migremuloj ne lasis sin timigi kaj reveninte ruĝvizaĝa, trablovita raportis pri unikaj perspektivoj kaj raraj renkontoj kun pegoj kaj aliaj sovaĝaj bestoj.



Reprezentantoj de la GEFA-delegacio ĉe la trilanda punkto
Vertreter der GEFA-Delegation am Dreiländerpunkt
(Foto: Bodo Ehrlich)

En apartaj programblokoj la reprezentitaj asocioj kunvenis laŭ siaj respektivaj statutoj. GEFA ligis sian kunsidon al publika prelego pri la sekvoj de la vetera katastrofo trafinta la Eifel-regionon kaj la najbarojn en Julio 2021, pri la konkludoj kaj la streĉoj rekonstrui kaj refunkciigi la detruitajn fervojajn liniojn.
La vesperojn okupis jen pli jen malpli laŭta muziko – el konservaĵo en la „gufujo“ aŭ vive

Neutral Moresnet verschwand im Jahr 1919 auch die Idee, dort einen Esperanto-Staat zu gründen.
Eine Minderheit der Kongressteilnehmer besuchte auf eigene Initiative die ehemalige nationalsozialistische Erziehungsstätte „Burg Vogelsang“. Das nie fertiggestellte Gebäudeensemble über dem Urft -Tal sollte gemeinsam mit anderen solchen Zentren als Geburtsstätte für neue Generationen der idealen germanischen Rasse dienen. Eine Sammlung ausgestellter Dokumente zeichnet den Weg der Nationalsozialisten an die Macht nach und das Konzept dieser Erziehungsanstalten, die sich „Schulen“ nannten, obwohl sie kein Wissen vermittelten, sondern Jugendliche formte, die blind gehorsam waren, körperlich trainiert und ihrer Auserwähltheit bewusst.
Das Gelände wurde bis zum Jahr 2004 als Übungsplatz der belgischen Armee genutzt und seit der Rückgabe der Erinnerung gewidmet.
Obwohl für den geführten Spaziergang an bestimmte Stellen im Naturschutzgebiet die Wetterbedingungen etwas unpassend waren, ließ sich eine Gruppe Wanderfreudiger nicht abschrecken und berichtete rotgesichtig und durchgeblasen nach ihrer Rückkehr von einmaligen Perspektiven und seltenen Begegnungen mit Spechten und anderen wilden Tieren.
In separaten Programmblöcken trafen sich die vertretenen Verbände nach ihren jeweiligen Statuten. Die GEFA verband ihre Sitzung mit einem öffentlichen Vortrag über die Folgen der Wetterkatastrophe, die die Eifel-Region und die Nachbarn im Juli 2021 getroffen hat, über die Schlussfolgerungen und die Anstrengungen, die zerstörten Eisenbahnlinien wieder aufzubauen und in Betrieb zu nehmen.
Die Abende belegte mehr oder weniger laute Musik – aus der Konserve im „Uhu-Nest“ oder live im großen Saal: JoMo debütierte nach eigener Auskunft als Ruheständler, mit einigen grauen Haaren mehr – zugegeben – sonst aber lebhaft und effizient wie immer – ein Künstler, der sein Publikum kennt.

en la granda salono: JoMo laŭ propra informo debutis kiel emerito, kun kelkaj pliaj grizaj haroj – koncedite - sed cetere vigla kaj efika kiel ĉiam – artisto kiu konas sian publikon.
Alian vesperon ni interkonatiĝis kun nova duopo „Mezbakita“, kiuj prezentis kantojn proprajn kun poeziaj tekstoj kaj (kiel diri?) „sendependaj“ melodioj kaj kiuj en la publiko kolektis kapvortojn kaj desegnaĵojn kiel instigojn por novaj kantoj. Ni atendu la rezulton.
La GEFA-estraro prilumis la evoluon de la pasinta jaro, speciale la zorgovekan membrostatistikon. Funkcioj kaj funkciuloj restis senŝanĝaj. GEFA-jarkunveno 2026 denove okazu – la aŭtuno ree liberiĝis. Loko antaŭvideble estos hotelo Lindenbach en Bad Ems.

An einem anderen Abend machten wir uns mit einem neuen Duo „Halbgebacken“ bekannt, die eigene Lieder zum Vortrag brachten, mit poetischen Texten und (wie soll ich sagen?) „Indie“-Melodien und die im Publikum Stichworte und Zeichnungen sammelten als Anregungen für neue Lieder. Erwarten wir das Ergebnis.
Der GEFA-Vorstand beleuchtete die Entwicklung des vergangenen Jahres, besonders die bedenkliche Mitgliederstatistik. Funktionen und Funktionäre blieben unverändert. Ein GEFA-Jahrestreffen wird es 2026 wieder geben – der Herbst ist wieder frei geworden. Der Ort wird vsl. das Hotel Lindenbach in Bad Ems sein.

Guido Brandenburg **(trad. Brandenburg)**



La lasta juvelo en la haveno Dessau-Roßlau / Das letzte Kleinod im Hafen Dessau-Roßlau
(Foto: Bodo Ehrlich)

Ruliĝanta teatro sur reloj

Al la Federacia Fervojo en la postmilita tempo mankis pasaĝertrafikaj vagonoj. Tial oni komencis grandan ŝanĝkonstruan programon surbaze de vagonoj da la iamaj landaj fervojoj. Por la nova serio 3yg nur estis reuzataj la ĉasioj kaj la ruliĝekipaĵo. La firme kuplitaj va-

Rollendes Theater auf Schienen

Der Bundesbahn mangelte es in der Nachkriegszeit an Reisezugwagen. Deshalb wurde ein großes Umbauprogramm auf der Basis von Wagen der ehemaligen Länderbahnen aufgelegt. Für die neue Gattung 3yg wurden nur die Untergestelle und das Laufwerk wieder

gonparoj havas la permeson por rapido de 100 km/h. La meza de la tri aksoj estas flanken ŝovebla kaj zorgu por pli trankvila kuro. Kelkaj vagonoj transvivis la tempojn ĉe muzeaj fervojoj aŭ kiel deĵoraj vagono de DB-Bahnbau. Plia unikaĵo sur la bazo de la iamaj ŝanĝkonstruitaj DB-vagonoj estas laŭ indiko de la ekspluatanto la mondvaste sola teatro-trajno. La trajno rondveturis kun sia programo „frotligno“ pri la vivo sur enlandaj ŝipoj en Junio kaj Julio tra Malsupra Saksio kaj Saksio-Anhalto. Konvene al la teatraĵo la prezentoj okazis sur trakaro de enlandaj havenoj, i.a. en Halle/ Saale, Dessau-Roßlau (Elbe) kaj Magdeburg (Elbe)„En la historia stacio de Geestenseth la dek vagonoj de la teatro ‚Das letzte Kleinod (La lasta juvelo)‘ havas sian operacian bazon. Per tiu oceanblua trajno la artista grupo realigas teatroprojektojn sur relvojo. La 130 metrojn longa trajno antaŭ nelonge estis multekoste renovigata kaj havas la permeson esti movata sur la publika trakreto. En kvar dormvagonoj nuntempe povas loĝi ĝis 17 kunlaborantoj en apartaj kupeoj. Ĉiu vagono disponigas duŝejojn kaj necesejojn. Restoracia vagono havas 32 sidlokojn. En moderna profesinivela kuirejo povas esti nutrataj 120 personoj tage. La trajno aldone enhavas teatran studion, oficejon, laborejojn kaj varvagonojn por la tetra teknikaĵo.“

(Fonto: www.das-letzte-kleinod.de)

La akronimo DLG (das letzte Kleinod) troviĝas inter la eŭropaj vagonnumeroj. Por la programo „frotligno“ oni aldone luis traireblajn varvagonojn el la serio Hbbillns kun ŝoveblaj kaskoj, en kiuj ludas unuopaj scenoj. Pri propra lokomotivo la trajnteatro ne disponas. Tie oni bezonas la helpon de alia fervojtrafika entrepreno.



Jen „frotligno“ / Das ist ein „Reibholz“.

Guido Brandenburg

verwendet. Die kurzgekuppelten Wagenpaare sind für eine Geschwindigkeit von 100 km/h zugelassen. Die mittlere der drei Achsen ist seitlich verschiebbar und soll für eine bessere Laufruhe sorgen. Einige der Wagen haben bei Museumsbahnen oder als Dienstwagen der DB-Bahnbau die Zeiten überdauert. Ein weiteres Unikat auf Basis der ehemaligen DB-Umbauwagen ist der nach Angaben des Betreibers der weltweit einzige Theaterzug. Dieser Zug tourte mit seinem Programm „Reibholz“ über das Leben auf Binnenschiffen im Juni und Juli durch Niedersachsen und Sachsen-Anhalt. Passend zum Stück fanden die Aufführungen auf Gleisanlagen von Binnenhäfen statt, u.a. in Halle/Saale, Dessau-Roßlau (Elbe) und Magdeburg (Elbe).

„Am historischen Bahnhof von Geestenseth sind die zehn Eisenbahnwagen des Theaters ‚Das Letzte Kleinod‘ stationiert. Mit dem ozeanblauen Zug führt die Künstlergruppe Theaterprojekte auf dem Schienenweg durch. Der 130 Meter lange Zug wurde kürzlich aufwändig saniert und hat die Zulassung, um auf dem öffentlichen Schienennetz bewegt zu werden. In vier Schlafwagen können derzeit insgesamt bis zu 17 Mitwirkende in Einzelkabinen wohnen, in jedem Waggon gibt es Duschen und Toiletten. Ein Speisewagen hat bis zu 32 Sitzplätze, in einer modernen Großküche können 120 Personen am Tag versorgt werden. Im Zug gibt es außerdem ein Theaterstudio, ein Büro, Werkstätten und einen Güterwaggon für Theatertechnik.“

(Quelle: www.das-letzte-kleinod.de)

Das Kürzel DLG (das letzte Kleinod) findet sich in den europäischen Wagennummern wieder. Für das Programm „Reibholz“ wurden zusätzlich begehbare Güterwagen der Gattung Hbbillns mit verschiebbaren Hauben angemietet in denen einzelne Szenen spielten. Über eine eigene Lokomotive verfügt das Zugtheater nicht. Hier ist man auf die Hilfe anderer EVU angewiesen.

(trad. Brandenburg)

Helga Vogelsang 08.03.1936 – 15.08.2025

Mallaŭta, fidinda, zorgema – tiuj estas nur kelkaj el la trajtoj, pri kiuj mi memoras pensante pri Helga. Se pravas la indikoj en la enarkivaj bultenoj, ŝi kiel fervojistino en merkatado laboranta en Ellrich estis varbita de Joachim Gießner 1994 kiel membro, kune kun Kathrin, kiu estis preskaŭ najbarino en Ellrich. La sekvajn jarojn la du virinoj ofte komune partoprenis niajn aranĝojn - Helga helpanta la preskaŭ blindan Kathrin, kvankam mem jam iom malsekura sur siaj kruroj. Helga baldaŭ post membriĝo jam transprenis asociajn funkciojn, unue tiun de komisiito por la distrikto Erfurt, poste de administranto de la asocia buĝeto ĉe BSW. Tiun ŝi plenumis ĝis la nuligo pro organizaj kialoj.



Helga en deĵora vestaĵo;
Helga in Dienstkleidung
(Foto: Bodo Ehrlich)

Vojaĝado fariĝis malfacila, sed de sia hejmo Helga klopodis kunagi kaj partopreni. Jen kaj jen, se temis pri poŝtmarkoj kaj bankaj negocoj, ŝi plendis pri la sekiĝanta infrastrukturo en Ellrich, kiu izolas enloĝantojn sen aŭtomobilo. 2024 GEFA rigardinte ŝiajn meritojn pri la asocio nomumis ŝin honora membro. La sanstato ankoraŭ en la sama jaro devigis ŝin forlasi sian hejmon kaj transiri al proksima flegejo, kie ŝi forpasis la 15-an de Aŭgusto 2025.

Ni funebras pri bona amikino.



Guido Brandenburg

Leise, verlässlich, sorgsam – nur einige der Züge, an die ich mich erinnere, wenn ich an Helga denke. Wenn die Einträge in den Zeitungen unseres Archivs recht haben, wurde sie, als Eisenbahnerin im Verkehrsdienst in Ellrich beschäftigt, von Joachim Gießner 1994 zusammen mit Kathrin als Mitglied geworben, die fast ihre Nachbarin in Ellrich war. Die folgenden Jahre nahmen die beiden Frauen oft zusammen an unseren Veranstaltungen teil – Helga, die der fast blinden Kathrin half, auch wenn sie selbst schon etwas unsicher auf den Beinen war. Helga übernahm bald nach ihrem Beitritt Aufgaben in unserem Verband, erst als Beauftragte für den Bezirk Erfurt, dann als Verwalterin des Verbands-Budgets beim BSW. Diese erfüllte sie bis zur Auflösung aus organisatorischen Gründen.

Reisen wurde schwierig, aber von ihrem Zuhause aus bemühte sich Helga mitzumachen und teilzunehmen. Hin und wieder, wenn es um Briefmarken und Bankgeschäfte ging, klagte sie über die austrocknende Infrastruktur in Ellrich, die die Einwohner ohne Auto isoliert. 2024 ernannte GEFA sie mit Blick auf ihre Verdienste zum Ehrenmitglied. Der Gesundheitszustand zwang sie noch im gleichen Jahr, ihre Wohnung zu verlassen und in ein nahes Pflegeheim überzusiedeln, wo sie am 15. August 2025 verstarb.

Wir trauern um eine gute Freundin.

(trad. Brandenburg)



De la surfaco nur estas videblaj la pli aŭ malpli kaŝitaj aperturoj.
Von der Oberfläche sind nur die mehr oder weniger versteckte Öffnungen zu sehen.
(Foto: Das neue Naturforum)

Malbonvena amiko

„Meles meles“, la eŭropa melo, „Grimbart“, la maskita aŭ la kolera el fabeloj – ĝi estas specio ne jam ekstermita, tamen malofta kaj tial adoptita de la Bern-a konvencio pri la konservo de sovaĝe vivantaj plantoj kaj bestoj kaj ties naturaj vivmedioj el la jaro 1979.

La naturan vivmedion de la melo formas miksitaj arbaroj, tie laŭeble arbusto-protektitaj randzonoj, kie ĝi lerte konstruas siajn kavernajn kastelojn vastajn kaj profundajn, tie pasigas la tagojn en trankvila ripozo kaj en la nokto ekstere ĉasas sian predon. Melon tial oni vidas nur malofte. Kion oni vidas, estas la aperturoj de ĝiaj kavernoj: Ene malhelo sen signo pri ilia profundo.

Arbusto-protektita randzono okaze ankaŭ estas taluso de fervoja linio. Ĉu pro manko de

Ein unwillkommener Freund

„Meles meles“, der europäische Dachs, „Grimbart“, der maskierte oder der grimmige aus den Märchen – er ist eine Art, die noch nicht ausgerottet, aber selten ist und deshalb von der Berner Konvention über die Erhaltung der europäischen wildlebenden Pflanze und Tiere und ihrer natürlichen Lebensräume von 1979 aufgenommen wurde.

Den natürlichen Lebensraum bilden Mischwälder, dort nach Möglichkeit durch Gebüsch geschützte Randzonen, wo er geschickt seine geräumigen und tiefen Höhlenschlösser baut, dort die Tage mit ruhigem Dösen verbringt und in der Nacht draußen seine Beute jagt. Einen Dachs sieht man daher nur selten. Was man sieht, sind die Öffnungen seiner Höhlen: Darin Dunkelheit ohne ein Zeichen für ihre Tiefe.

alternativoj, ĉu pro konvena materialo, ĉu pro relativa trankvilo de maldenstakta regiona trafiko: Okaze fervoja taluso invitas melo-familion tie instali sian sidejon kaj kaŭzi problemojn al la dommastroj.
Certe la fervoja infrastrukturo estas regule kontrolata. Malregulaĵojn pri la stabileco de la subgrundo malkovras inspektanta personaro per specifaj aparatoj. Sed ofte tiu inspekto ne atentigas pri la komenco de la melo-aktivecoj, ĉar la konstruado komenciĝas en kaŝita loko. Estas tro malfrue, se evidentiĝas la sekvoj en trakgeometriaj devioj.



Intertempe la naturo rekonkeras la traceon inter Unna kaj Fröndenberg.

Inzwischen erobert die Natur die Trasse zwischen Unna und Fröndenberg zurück.

(Foto: Mediathek Deutsche Bahn)

Ekzemplo estas la unutraka linio inter Unna kaj Fröndenberg en suda Vestfalio, linio longa iom pli ol 12 kilometrojn kun du interaj haltejoj en Frömern kaj Ardey. Ĝi kondukas tra la pitoreskaj altaĵoj de „Haarstrang“. Najbaraj loĝdomoj estas maloftaj.
Unuajn damaĝojn pro kolapsinta melo-nesto oni ekkonis jam 2022 kaj klopodis ilin ripari per injekto de betonmiksaĵo. Samtempa fokusita kontrolo tamen montris, ke la taluso estas subfosita preskaŭ laŭ la tuta traceo kaj ke temis ne nur pri unu familio, sed pri tuta gento. Estis trovataj ĉ. 140 aperturoj.
Pripensoj, ĉu necesus kompleta novkonstruo, post esploro de alternativaj resanigaj konceptoj ne devis esti plue konsiderataj. Nun la kontraŭmela strategio krom la injekton de betono antaŭvidas nun ankaŭ la enkonstruon de

Ein durch Gebüsch geschütze Randzone ist gelegentlich auch der Damm einer Eisenbahnstrecke. Ob aus Mangel an Alternativen, ob wegen des passenden Materials, ob wegen der relativen Ruhe eines dünn getakteten Regionalverkehrs: Gelegentlich lädt ein Bahndamm eine Dachsfamilie ein, dort ihren Stammsitz einzurichten und den Hausherren Probleme zu bereiten.
Sicherlich wird die Eisenbahninfrastruktur regelmäßig kontrolliert. Unregelmäßgkeiten in der Stabilität des Untergrunds werden vom Inspektionspersonal mit den spezifischen Geräten entdeckt. Aber diese Inspektion macht häufig nicht auf den Beginn der Dachs-Aktivitäten aufmerksam, weil der Bau an einer verborgenen Stelle beginnt. Es ist zu spät, wenn sich die Folgen in Gleislagefehlern offenbaren.
Ein Beispiel ist die eingleisige Strecke zwischen Unna und Fröndenberg im südlichen Westfalen, eine Strecke mit einer Länge von etwas mehr als 12 Kilometern und zwei Unterwegs-Haltepunkten in Frömern und Ardey. Sie führt über die beschaulichen Höhen des Haarstrangs. Wohnhäuser in der Nachbarschaft sind selten.
Erste Schäden durch einen eingestürzten Dachsbau stellte man schon 2022 fest und versuchte, sie durch Injektion einer Betonmischung zu beheben. Eine gleichzeitige fokussierte Untersuchung zeigte jedoch, dass der Damm fast auf der ganzen Trasse untergraben war und es nicht nur um eine Familie, sondern um einen ganzen Stamm ging. Es wurden ca. 140 Eingänge gefunden.
Überlegungen, ob ein kompletter Neubau notwendig sein könnte, mussten nach Untersuchung alternativer Sanierungskonzepte nicht weiterverfolgt werden. Die Anti-Dachs-Strategie sieht nun neben der Betoninjektion auch den Einbau von Spundwänden und unterirdischen Metallgittern vor. Weil auch das ein Budget erfordert, eine Ausschreibung und eine Umsetzung, wird ein regulärer Zug erst ab 2028 den Transport der Reisenden von den Ersatzbussen übernehmen können.

ŝtalpalisaj vandoj kaj subteraj metalkradoj. Ĉar ankaŭ tio postulas buĝeton, adjudikon kaj realigon, regula trajno nur ekde 2028 povos ree transpreni la pasaĝeran trafikon de la substituaj aŭtobusoj.
Kondiĉoj kiel inter Unna kaj Fröndenberg regas kompreneble ankaŭ sub aliaj fervojaj linioj. Ankaŭ diligentaj meloj ne nur loĝas tie:
2021 necesis dum 11 monatoj bari Freinsheim-Bad Dürkheim pro melo-tuneloj kaj inunda pluvo;
2022 dum tri monatoj Freinsheim-Grünstadt pro melo-tuneloj;
2024 Monsheim-Eppelsheim dum ses monatoj;
2025 Wegberg-Dalheim por unu monato;
2025 Scharbeutz-Neustadt por unu semajno;
2025 Bad Dürkheim-Deidesheim por 10 monatoj laŭ prognozo;
2025 Landau-Winden por tri semajnoj;
2025 Weilheim-Peißenberg por unu semajno.
Ĉu nun malbeni la neinvititajn gastojn? Ili estas parto de la naturo, kiun predendas respekti speciale la fervojo. Toleri ilin, ne eblas. Tion malpermesas la sekureco. Alternativo nur estas bari por la meloj aliron al la taluso kaj lasi al ili konvenan spacon en alia loko.



Bedingungen wie zwischen Unna und Fröndenberg herrschen selbstverständlich auch unter anderen Bahnstrecken. Auch leben fleißige Dachse nicht nur dort:
2021 musste Freinsheim-Bad Dürkheim für 11 Monate wegen Dachstunneln und Starkregen gesperrt werden;
2022 für drei Monate Freinsheim-Grünstadt;
2024 Monsheim-Eppelsheim für sechs Monate
2025 Wegberg-Dalheim für einen Monat;
2025 Scharbeutz-Neustadt für eine Woche;
2025 Bad Dürkheim-Deidesheim nach Prognose für 10 Monate;
2025 Landau-Winden für drei Wochen;
2025 Weilheim-Peißenberg für eine Woche.
Soll man sie nun verfluchen, die ungebetenen Gäste? Sie sind Teil der Natur, die gerade die Bahn besonders respektieren will. Sie zu tolerieren, geht nicht. Das verbietet die Sicherheit. Eine Alternative ist nur, den Dachsen den Zugang zum Bahndamm zu versperren und ihnen an anderer Stelle einen passenden Raum zu lassen.



Guido Brandenburg **(trad. Brandenburg**

Nova varbfolio de GEFA en Esperanto

Okaze de la GeBeNeLuks-a kongreso en Schleiden-Gemünd GEFA eldonis reviziitan varbilon en Esperanto. Ĝi turnas sin al parolantoj de Esperanto, kiuj renkontas la fervojon kun intereso kaj simpatio. Kiel la antaŭa ĝi atentigas pri la fakto, ke membreco en nia asocio ne plu anticipas nuntempan aŭ pasin

Neues Werbeblatt der GEFA in Esperanto

Aus Anlass des Deutsch-BeNeLux-Kongresses in Schleiden-Gemünd hat die GEFA ein überarbeitetes Werbeblatt auf Esperanto herausgegeben. Es wendet sich an Esperanto-Sprecher, die der Eisenbahn mit Interesse und Sympathie begegnen. Wie das vorhergehende weist es auf die Tatsache hin, dass die Mit-

tan laboron en fervoja entrepreno. Pro kelkaj enhavaj adaptoj necesis noveldono. Interesatoj, kiuj volas informi pri GEFA kaj varbi por ĝi, povas mendi kvanton de la folio ĉe nia redakcia adreso (vd. sube).



gliedschaft in unserer Vereinigung nicht mehr eine gegenwärtige oder frühere Arbeit bei einem Eisenbahn-Unternehmen voraussetzt. Wegen einiger inhaltlicher Anpassungen war eine Neuherausgabe erforderlich. Interessierte, die über die GEFA informieren und für sie werben wollen, können eine Anzahl des Blatts über unsere Redaktionsadresse anfordern (s. unten).

Guido Brandenburg **(trad. Brandenburg)**

Obstakloj en la komunikado

Pensite ne ĉiam signifas dirite.

Dirite ne chiam signifas ĝuste aŭdite.

Aŭdite ne chiam signifas ĝuste komprenite.

Komprenite ne ĉiam signifas konsentite.

Konsentite ne ĉiam signifas aplikite.

Aplikite ankoraŭ longe ne signifas konservite.

(trad. Esperanto-grupo Kassel)

Hindernisse in der Kommunikation

Gedacht heißt nicht immer gesagt.

Gesagt heißt nicht immer richtig gehört.

Gehört heißt nicht immer richtig verstanden.

Verstanden heißt nicht immer einverstanden.

Einverstanden heißt nicht immer angewendet.

Angewendet heißt noch lange nicht beibehalten.



Konrad Lorenz

Redaktofino por FE 01/2026 estos la 15.02.2026		Redaktionschluss für FE 01/2026 ist der 15.02.2026	
Eldono:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.	Herausgabe:	Stiftung Bahn-Sozialwerk Zentrale Frankfurt/M.
Redakcio:	Guido Brandenburg	Redaktion:	Guido Brandenburg
Adreso:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt	Adresse:	Görlitzer Straße 17 48317 Drensteinfurt
Telefono:	02508-9107	Telefon:	02508-9107
Retpoŝto:	fervoja.esperantisto@t-online.de	E-Mail:	fervoja.esperantisto@t-online.de
Kotizkonto:		Beitragskonto:	
Nomo	BSW Esperanto Essen	Name	BSW Esperanto Essen
IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63	IBAN:	DE44 3606 0591 0000 5045 63
BIC:	GENODED1SPE	BIC:	GENODED1SPE
Donacoj estas bonvenaj sur konto:		Spenden sind willkommen auf dem Konto:	
Nomo	Andreas Diemel GEFA	Name	Andreas Diemel GEFA
IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29	IBAN:	DE16 5009 0500 0000 9537 29
BIC:	GENODEF1S12	BIC:	GENODEF1S12